Thomas Moore,

La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

kun ok-liniaj strofoj

Jen floras sola, forlasita
La lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro,
Velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca,
Nek roz-burĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn
Aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca,
Ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas,
Do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable
Disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma,
Malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos
De l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo
Elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj,
Sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi
Solece en malvarma rondo?

Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer" de Thomas Moore *(*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* Antoni Grabowski *(*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-531-1059 (2010-03-28 21:24:14)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo `http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT`.